



# ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha XIX/7 - 7075. — Redaktas Dr Stanislav Kamarýt.

## William Solzbacher: „Jazykový boj“ zuří ve Spojených národech

Následkem přijetí španělštiny za třetí »pracovní jazyk« octly se Spojené národy nyní v útrapách nového »jazykového boje«. Ruské a čínské pokusy, aby také získaly »pracovní« statut pro své jazyky, zůstaly sice bez úspěchu v Paříži v prosinci 1948, ale oba národy naznačily, že vznesou tento požadavek opět, až valné shromáždění bude zasedati v dubnu 1949 ve Flushing Meadow v Novém Yorku.

»Byl všeobecný souhlas ve výboru i ve shromáždění,« konstatuje oficiální Věstník Spojených národů ve svém prvním lednovém čísle, »že by bylo žádoucí připustiti další jazyky mezi jazyky pracovní; neshodu působily jen praktické, administrativní a finanční nesnáze.« Druhá část tohoto výroku je pozoruhodné podceňování. Nebyla by to malá věc, kdyby byly ruština a čínština připojeny k »pracovním jazykům« Spojených národů a každé slovo, promluvené na tisících shromážděních SN, musilo by být překládáno a »zpracováno« v pěti jazycích. Není pravděpodobné, že takové usnesení bude učiněno tohoto jara, protože ani Rusko ani Čína nevládnou zatím dostatečným počtem hlasů ve shromáždění. Sekretariát přispěje k tomu zase další »reformou«. »Bitva« bude pravděpodobně zastavena nějakým příměřím, ale musí se očekávat, že vypukne opět při pozdějším datu.\*)

Když bylo dohodnuto na konferenci v San Francisku 1945, že angličtina, francouzština, španělština, ruština a čínština budou oficiálními jazyky SN, bylo zjištěno, k lítosti mnohých, že je prakticky nemožno užívatí všech těchto pěti řečí pro všechny účely. Angličtině a francouzštině bylo proto dáno privilegované postavení »pracovních jazyků«. To znamená, že projevy mohou

\*) Skutečně návrhy o ruštině a čínštině byly 11. května odloženy na příští zasedání. (Pozn. překl.)

býti přednášeny a podání předkládána v jednom z pěti »oficiálních« jazyků, ale že všeobecně jsou překládány toliko do těch dvou »pracovních« jazyků.

Bylo též dohodnuto v principu, že nejdůležitější doklady a publikace mohou býti publikovány ve všech pěti jazycích. Ve skutečnosti však ruským a čínským publikacím SN nikdy nebylo možno dosáhnouti ostatní. Když začal v srpnu 1946 vycházeti týdení Věstník SN, byli v prospektu tázáni předplatitelé, které z pěti vydání si přejí. Ve skutečnosti ruské a čínské vydání Věstníku neexistuje dodnes. Ostatní tři vydání opustila z technických a finančních důvodů koncem roku 1947 týdení vycházení a jsou z nich čtrnáctideníky.

Návrh, aby španělština se stala »pracovním« jazykem, byl předložen ponejprv v říjnu 1947 Filipinami, byl však odborně předán sekretariátu k prostudování. Byl předložen později opět jakožto »společně zredigovaná resoluce«, podepsán delegáty Bolívie, Čile, Kuby, Haiti, Mexika, Peru, Filipín a Uruguaye. Generální sekretariát SN podal v září 1948 zprávu, že zavedení španělštiny způsobí zvýšení výdajů asi o 2 miliony dolarů. Věřilo se všeobecně, že pro valné shromáždění, vždy na rozpočet myslící, bude to dostatečný důvod, aby resoluci zabilo. To se stalo v administrativním a v rozpočtovém výboru, ale ne ve shromáždění. Vznikla aliance mezi 20 státy latinské Ameriky a 6 arabskými státy plus Filipíny, Habeš, Liberie, Burma, Íran a Řecko a španělština 7. prosince vyhrála proti hlasům všech velmocí 32 hlasy proti 20 při 5 nehlasovavších.

Z toho je plesání v latinské Americe, jak se dalo očekávat. V Buenos Aires na př. týdeník »Criterio« prohlašuje nadšeně, že »španělština je jazyk internacionálů, vehiculum ideí, naplně-

*Na shledanou na VII. sjezdu čs. esperantistů v Liberci  
dne 4.—6. června!*

ných universálností a šlechetností, řeč pro lidi hodné počt, nechť se liší jakkoli svými výkony hospodářskými a kulturními». Článek se posmíval nárokům jiných jazyků, protože »ruština ani čínština jistě se nehodí k dialogu mezi národy« a také »hanebnému důvodu o zvýšených nákladech«, a končil: »Španělsky mluvící národy získaly nyní vzrůstající význam mezi demokraciemi světa.«

Je skutečně těžko popíratí, že španělština má nárok na rovná práva jako angličtina a francouzština. Je stejně těžko popíratí, že ruštinou a čínštinou mluví daleko více lidí než španělštinou. A za nějakou chvíli zástupci němčiny, japonštiny, hindustani a malajštiny mohou zdůrazňovatí o každém z těchto jazyků, že mu rozumí nebo jím mluví více lidí než francouzsky. Některý italský státník může si přátí, aby znovu byl uznán důvod pro italštinu, který se nepodařilo uplatnití baronu Soninovi při posledním mírovém jednání ve Versailles. Šest arabských států, k nimž v nepřilíš daleké budoucnosti přibudou Transjordanie, Maroko, Tunís, Lybie atd., může uplatňovat, že arabština je jazyk největšího počtu členů SN, vyjma španělštinu. Všechny tyto nároky budou »spravedlivé«, ale jejich uznání učinilo by mašinerii SN nevladatelnou.

## Novaj libroj

Tiu ĉi nomaro, kvankam ne kompleta, estas mia kutima suplemento al listoj pri novaj libroj, kiuj aperis lastjare. La cititaj libroj ne estas vendotajoj.

### Nacilingvaj tradukoj:

El la angla: F. W. Crofts: *Morto de trajno* (tradukis M. Stuttard), 256 paĝoj; Shakespeare W.: *La gajaj edzinoj de Windsor* (S. A. Andrew), 90 p.; Stevenson R. L.: *Diabla en la botelo* (J. Seka), 48 p. El la ĉeĥa: Čapek K.: *Skizoj pri Nederlando* (G. J. Degenkamp), 96 p. El la finna: Kivi Aleksis: *Sep fratoj* (Ilmari Ekström), 360 p. El la franca: Fontaine J. de la: *Fabloj* (L. Thévenin), 82 p.; Kardec A.: *La evangelio laŭ Spiritismo* (Ismael G. Braya). El la holanda: Polak M. W. Inĝ.: *La tutmonda ĉefestraro* (Tj. Postma). El la hungara: Petőfi S.: *Johano la Brava* (K. Kalocsay), 65 p., 2-a eldono; Zilahy L.: *Printempo de morto* (L. Spierer). El la portugala: Carac a Bento de Jesus: *Galileo Galilei* (Manuel de Freitas); *Agostinho da Silva: La Budhismo - La prahistoria arto* (José de Freitas Martins); la sama aŭtoro: *La portugala lingvo* (M. de Freitas); la sama aŭtoro: *Historio de Nederlando* (José de Freitas Martins); la sama aŭtoro: *Pro tri pingveraj ovoj* (M. de Freitas); la sama aŭtoro: *Vivo de Nansen* (Ed. da Mota Padrão).

### Originalaj verkoj:

Bruin G. P. de: *Gvidilo tra la Esperanto-movado* (Suplemento 1936—1948). Dellijan C.: *Racia kaj internacia Nomenklatur*, Kraus H.: *Ĉu militoj estas eviteblaj? Faktoj pri Danlando*. La nuntempa Pollando. Lindqvist K.: *Ferio kun la Morto*. Rodo L.: *Vivo de Pissarro*. Stöpp-Bowitz C. kaj

Přidány k nespočetným nedorozuměním a k neodstranitelnému zmatku a podráždění, způsobenému překlady, i když překladatelé jsou nejvyšší kvality, nesmířitelné nároky mnoha národních jazyků tvoří vážnou překážku k dorozumění a spolupráci. Logický prostředek odstranění tyto překážky bylo by přijetí jednoho společného jazyka, nějaké neutrální interlingvo, které by skoncovalo s privilegiem několika jazyků i s rivalitou mezi nimi a postavilo by všechny delegáty na touž základnu. Esperanto si činí nárok, aby bylo odpovědí na tuto otázku. Ti, kdož užívají esperanta, mohou poukázatí na velký počet autoritativních svědectví i na faktickou evidentnost. Mnohá svědectví sebral už sekretariát starého Svazu národů, předchůdce SN, ve zprávě generálního sekretariátu »Esperanto as an International Auxiliary Language«, přijaté v třetím valném shromáždění Svazu v Ženevě r. 1922.

Z anglického v *American Esperanto-Magazine* (Jan.—Feb. 49) přeložil S. K.

Budiž dovoleno, aby překladatel poznamenal, že i zde uvedené detaily potvrzují vůli k míru Sovětského svazu, na př. fakt, jak hned přijal úpravu jazykové otázky v San Francisku, zřejmě, aby nebrzdil začátek práce Spojených národů.

Ir. J. R. C. Isbrücker: *La Esperanto-movado, ĝia historio kaj nuna stato*, Saratov J.: *Legolibro por superaj kursoj kaj memklerigo*. Székelyi L.: *Propagando de Esperanto*. Theobald H.: *Dokumentoj de la rezistado*. Wagner H.: *Ni devas diri ĝin*. Waringhien G.: *Leteroj de L. L. Zamenhof*. Quarello: *Lernu Esperanton!*

### Kantaro:

J. Muusses: *Internacia kantaro* (La Juna vivo).

### Diversaĵoj:

Jarlibro de la *Universala Esperanto-Asocio* — 1948 (en du partoj). Jarlibro de *Sennacia Asocio Tutmonda* (1948). La 31-a kongreso de la bulgaraj esperantistoj en Jambol. Pensoj de Zamenhof (tradukitaj el Esperanto france, angle, germane kaj itale). D-ro Esperanto: *Internacia lingvo* (por Rusoj) - faksimila represo de la Unua libro Zamenhofa.

### Verkoj de ĉefaj esperantistoj:

Jan kaj Karel Filip: *Kantareto* (II-a eldono). Jan kaj Karel Filip: *Esperanto a katolici*. Th. Kilian: *Esperanto, učebnice a čítanka* (VI-a eldono). J. Mařík: *Konstitucio de Ĉeĥoslovaka Respubliko*. Julie Šupichová: *Malá učebnice esperanta. Slovníček esperantsko-český* (II-a eldono).

### Verkoj de slovakaj esperantistoj:

M. Benka: *Slovaka popolokanto*. J. V. Dolinský: *Momenta rigardo en la trezorejon de la slovakaj popolokanto*. La sama aŭtoro: *Malý slovník esperantsko-slovenský a slovensko-esperantský*.

J. Šupichová.

## Al nia junularo!

En Aŭgusto (3.—10.) okazos en Parizo Internacia kongreso de Junularo Esperantista. Ni estis informitaj, ke povos partopreni 4—5 delegitoj, kiuj estas membroj de ĈSM kaj scias bone Esperanton. — Anoncu vin tuj ĉe nia Asocio! Klubo, atentigu la gejunulojn de via grupo. Urĝas!

## Al nia junularo en Praha!

Ambaŭ gvidantoj de la junulara sekcio asocia (Špaček kaj Lippert) devis rezigni pro privataj kaŭzoj. — La agado de la junulara sekcio de nia Asocio promesplene evoluas. Ni bezonas novajn gvidantojn, kiujn ni esperas trovi inter la esperantista gejunularo en Praha. Kiu sin anoncas? Skribu al la Asocio!

# KRONIKO ENLANDA

Verda stacio dissendis la 4-an de Aprilo Konversacion kun la aŭskultintoj respondante al iliaj demandoj kaj deziroj. Estis prezentita de f-ino Vlasta Zvěděliková la Lulil-kanto el opero Kiso kaj rusa popolkanto Najtingalo, krom klasika ĉeĥa muziko kaj japana poemo. La tekstaron verkis kaj aranĝis Ant. Slanina kaj Miloš Nývlt.

La 2-an de Majo estis prezentita populara ĉeĥa unuakta komika opero de Blodek „En la puto“, kies versojn tradukis Dr T. Pumpr kaj Dr J. Fousek. Klarigajn tekstojn verse verkis T. Pumpr, deklamis ilin K. Höger, Lida Klimešová, Zd. Procházková. Kantis elstaraj membroj de la Nacia Teatro Lidunjon Marie Tauberová, Verunkan Lidmila Hanzalíková, Adalberton Antonín Votava, Jankon Karel Kaláš. Kantis ĉs. Radio-ĥoro, kies kondukisto estas Jiří Pinkas, muzikis Radio-orkestro, kondukata de Frant. Dyk. Enkondukajn vortojn parolis Ant. Slanina, Regisoris Dalibor Chalupa. La programo daŭris 80 minutojn kaj estis dissendata krom sur kutimaj ondoj ankaŭ sur Praha 1, kiu kutime dissendas dum tiu tempo siajn glorajn noktajn koncertojn. La prezentado meritas laŭdon senrezervan same la tuto kiel la unuopaj rolantoj. La klarigaj tekstoj tre utilis al kompleta kompreno, la operaj versoj estis tre kanteblaj kaj kompreneblaj. La kantantoj estis ĉiuj eminentaj aktoroj, kiuj enmetis dum tiu vespero en siajn kantojn ankoraŭ pli ol kutime. Eĉ tiu, kiu aŭskultis la popularan operon plurfoje, kaj ĉe kiu rolis la infanrememoroj optikaj kaj akustikaj samtempe, aŭskultadis dum tuta tempo streĉite kaj li prave konjektas, ke tiuj, kiuj aŭdis la melodiojn unuan fojon, estis despli ravitaj. Prezento de la opero „En la puto“ estis el ĉiuj starpunktoj faro eminenta. Dankon al la aktorantoj same kiel al la direkto de la Radio-Praha.

Per tiu programo finis sezono de la Verda stacio. Dum somero ĝi dissendos arto programon nur dek-minutan ĉiun unuan vendredon je la 22,50—23,00 horo de somera mez-eŭropa tempo; dum aŭtuno ĝi revenos al la jam kutimaj horoj. Ne forgesu aŭskulti ankaŭ tiujn ĉi programojn kaj konfirmu la aŭdon.

Pola vespero kun honora patroneco de pola ambasado en Praha, organizita de Esperantista Klubo la 6-an de Majo en Slovanský dům kun prelego de elstara pola esperantisto profesoro Jakob Garbar el Wrocław, kiu parolis pri nova Pollando kaj pri la mondfama muzika komponisto F. Chopin, estis tre sukcesa. Ceestis ĉ. 200 p.

En internacia konkurso „Kristo kaj la mondŝtateco“, aranĝita el fondajo de sinjorino A. F. G. Van Loan en Genevo, oni uzas Esperanton apud la kvin mondlingvoj kaj tekstoj enskribataj sur diplomoj estas nur en Espe-

ranto. Partoprenis en tiu ĉi jaro multaj junaj homoj el la tuta mondo, sopirantaj pri la mondpaco. El Ĉeĥoslovakio ricevis premiojn inter la gejunuloj J. Pilátová, B. Ormisová, D. Soukupová, Miloslav Janek, inter la malpli junaj J. Voda, J. Saga, J. Uličný, J. Paláček k. a. (jnk)

**Gazeteltranĉaĵoj.** Dum Aprilo ĝis Decembro 1948 ni ricevis sume 305 gazeteltranĉaĵojn menciantajn Esperanton. El tiu nombro estis 187 el 24 gazetoj, aperantaj en 10 urboj de Bohemio, 90 el 14 gazetoj, aperantaj en 6 urboj de Moravio kaj 28 el 6 gazetoj de 2 urboj slovakiaj. La plej aĝemaj estis s-anoj el Liberec, Praha kaj Brno. Ĉi tiu statistiko certe ne estas kompleta kaj ni petas denove ĉiujn membrojn, kiuj sendadas sciigojn pri Esperanto en gazetojn, ke ili zorgu ankaŭ pri alsendo de eltranĉaĵoj al ni. (Fr. Vyskočil)

**Regiono Brno.** La dua regiona kunveno okazis post 2-jara paŭzo dimanĉon la 8-an de Majo en hotelo Passage en Brno. Sabaton vespere aranĝis E. Klubo en kafejo Slavia amikan vesperon, kiu kunvenigis 75 s-anojn, kiuj en amika kuneso ĝuis deklamadon, paroladojn, ĝajajn kantojn, komunajn kantojn eĉ sorĉarton de niaj sindonaj samideanoj. — La regionan kunvenon, kiun prezidis la nova regiona peranto J. Friedrich, partoprenis 29 s-anoj. Estis reprezentataj Brno (15), Židenice (4), Boskovice, Břeclav, Lanškroun, Lanžhot, Mor. Nová Ves, Ruprechtov (Vyškov), Soběšice, Svitavy, Zbýšov. — Asocia vicprezidanto R. Hromada el Praha informis komence la kunvenintojn pri la nuna stato de la movado en Ĉeĥoslovakio, akcentis la gravecon de la nunjara kongreso en Liberec kaj donis interesajn novaĵojn el la movado ĝenerale. — Regiona peranto montris poste la statistikon de esperantistoj en la regiono. Krom 2 kluboj en Brno kaj Židenice, kiuj havas ĉirkaŭ 200 membrojn, estas en la regiono sole 116 organizitaj esperantistoj en 67 lokoj. Krom Brno kaj Židenice ekzistas klubo sole en Břeclav kaj ĵus oni fondas klubon en Svitavy. Estas necese revivigi la movadon en aliaj lokoj, precipe en Znojmo, Vyškov, Boskovice. — En la administra jaro 1948/49 okazis en Brno 3 kursoj por komencantoj kaj 2 por progresintoj, en Židenice 3 kursoj por komencantoj, 1 por progresintoj kaj 1 ekspozicio, en Břeclav, Ivančice kaj Svitavy po 1 kurso. Por intensigi la propagandon oni kolektis la nomojn de personoj, kapablaj prelegi publike pri Esperanto kaj instrui la lingvon. En vigla diskuto oni preparis la aŭtunan programon. Estis esprimita la deziro, ke la venontan regionan kunvenon partoprenu pli multaj s-anoj, almenaŭ el ĉiuj gravaj lokoj de la regiono. — Granda parto de kunvenintoj ekskursias posttagmeze per vaporsipo sur la lago apud Bystrc. — (J. Friedrich)

## NI LEGIS

Alvokon de nia komitatano Jiří Kořínek, ke estu komencitaj fare de Akademio de Esperanto laboroj por eldoni Plenan Vortaron, 7-oble pli ampleksan ol estas la nuna dua eldono de P. V., kaj ke estu kolektata fondajo por ebligi la eldonon finance, publikigis Heroldo, Internacia Kulturo kaj Literatura Mondo. Ni tre ĝojas pro publikeco, kiun ricevis iniciato de nia kunlaboranto ĉe redakcioj de niaj plej ĉefaj gazetoj. Jam el tio estas videbla, kiom respondas lia iniciato al postuloj de nuntempo. La redakcioj de I. K. kaj L. M. nenion rimarkigis al la projekto. En Heroldo Teo Jung diras, ke pli urĝa estus eldono de esperantlingva Enciklopedio du- aŭ tri-voluma antaŭ ol oni komencos prilabori grandan Plenan Vortaron. Al ni ŝajnas rimarkinde konstati la fakton, ke Waringhien prilaboras, helpata de multaj fakuloj, trian eldonon de la Plena Vortaro, kiu titolos P. V. Ilustrita kaj havos pli ol 1000 paĝojn, do amplekson pli ol duoblan kompare kun la dua eldono. Certe propono de samideano Kořínek estas iniciato tre atentinda, kaj „Akademio de Esperanto“ (kiom malsimpatia nomo post la bela kaj modesta Lingva Komitato!) devus komenci laboron pri ebleco de efektiva kolektante por esploro terminojn, kiuj ne estas en la P. V. ĝisnuna, kaj proponante al kritiko kaj forstreko radikojn malnoviĝintajn. Tiu laboro povus iri paralele kun

fiksado de gramatika karaktero kaj signifo de oficialaj radikoj.

**Dano pri Ĉeĥoslovakio.** S. K. Nielsen el Fredericia prelegis la 17-an de Okt. en Leeuwarden, 18-an en Amsterdam, 21-an en Hilversum, 22-an en Deventer kaj 23-an en Hengelo pri Ĉeĥoslovakujo, montrante interesajn lumbildojn pri tiu lando kaj la Sokol-kongreso en Praha. (Nederlanda Esperantisto, Nov. 1948.) (O. G.)

**Pri ĉeĥa poezio** precipe pritraktante la poemaron „Bukedo“ prelegis en la Esperanto-klubo en Bergen la 12-an de Decembro Kjell Offerdal kaj legis ankaŭ norvegan tradukon de unu el la poemoj en Bukedo. Ni salutu lin tie ĉi amike. (Laŭ Norvega Esperantisto, Jan. 49.)

Al sia amiko Veverka en Brno dankas pro sendo de la „Ĉs. Konstitucio“ Joab Eljot, redaktoro de Eta Heroldeto en Willoughby N. S. W. (2 Cambridge St.) Aŭstralio. Samtempe li plendas pro nesufiĉo da liberecoj en sia patrujo. „La popolo tie naĝas en tia densa maro el dekretoj, leĝoj, ordonoj kaj reguloj, ke, miaopinie, ili ankoraŭ ne havas ian koncepton pri kio estas: spiri la puran kaj freŝan aeron de la Libero.“ (Marto 1949.)

La moralo en Sovetio kaj en la kapitalismaj landoj, artikolon de Aleš Suchý el Rudé právo, publikigis en traduko de E. Urban Internacia Kulturo (1-a n-ro 1949).

**Somera Esperanto-Lernejo en Dokszy** estas montrita kiel „modelo por multaj“ en anglalingva artikolo en aŭstralia „La Rondo“ (Febr. 1949).

**Legendo pri sankta Zita**, la glora poemo de Vrchlický en Lukáš-traduko, aperis en unua kajero de Literatura Mondo (1/2 n-ro 1949). La kajero krome enhavas poemon de Pič „Lavistino“ kaj pledon de dro Pumpr por nominativo post „po“. Ni enskribu tiujn faktojn kiel pluan pruvon de aktiveco de ĉefiaj esperantistoj, kiu estas dum postmilita tempo edife rimarkinda.

**Literatura Mondo** aperigis jam du kajerojn en tiu ĉi jaro, atinginte tiel regulecon en sia aperado. La redakcio kaj la administracio estu pro tio salutitaj varme kaj amike! Ni enskribu tie ĉi aparte tradukon de la japana novelo de Yosiki Hayma „Letero el Cementbarelo“, kies lego elvokas tremigan senton, kaj krome ni konstata, ke ni ne kredas profetaĵon en poemo de J. S. Dinswoodie (tre bona laŭ la lingvaĵo, ritmo kaj rimoj): ne, la herbo ne venkos sur nia planedo, ni homoj venkos en nia strebado plibonigi la mondon, la herbo ne sufokos tion, kion ni volas konservi vivanta.

**Bolivia Esperanto-Asocio** okazigis sian unuan jarkunvenon en la lastaj tagoj de Oktobro 1948 en La Paz. Decidus eldonadi ciklostilitan dumonatan organon, **Bolivia Revueto**, kies unua numero aperis en Januaro, 16 paĝoj. (Av. 20 de Octubre, n-ro 365.) Sur la titolpaĝo estas mapo de Bolivio, kie 9 steloj indikas lokojn, kie jam estas esperantistoj. Kun plezuro ni legis artikolon „Ĉu vi sciis pri Bolivio, ke...“ Efektive ni ne sciis tion.

**Stellan Engholm** estis 50-jara la 25-an de Marto. Ni salutis lin pro ĉiuj kvalitoj, kiujn devas posedi verkisto kaj kiujn li posedas en admirinda pleno. Li multon faris por nia movado same kiel originala aŭtoro tiel tradukanto. Sed precipe ni emfazis lian „Malgrandan Revuon“.

**Heroldo de Esperanto** havis en 1946 1530 abonantojn, en 1947 1750, en 1948 2100. Ni uzu la okazon de ĝia 25-jara ekzisto por konstati, ke ĝi estas gazeto efektive redaktata, ke samideano Jung scias ofte admirinde kolekti informojn kaj artikolojn interesajn eĉ por tiu, kiu multon legas. Li estu salutita de ni tre sincere. Ni tre bedaŭras, ke pro valutaj cirkonstancoj ni ne povas pli intense varbi abonantojn por ĝi.

**Hispana Esperanto-Federacio** (Ruzafa, 7, Valencia) komencis de Januaro aperigi belan 8-paĝan monatan bultenon „Boletín“. Tre leginda estas en ĝi „Inter la prozo de la esperantista gazetaro“ de l' „legema koboldeto“. En dua numero estas enskribita nia „bele presita sur biblia papero folio „Esperanto-Servo“ pri la tiea vivmaniero“ kaj „Facile legebla, eĉ por komencantoj nia mezeŭropa kolego Esperantisto Slovaka kun interesa artikolo por hispanoj pri la slovakaj ŝakfajloj, tiel simila al la galega muzikilo nomata „gaita“, slovakke nomita „gajda“, t. e. preskaŭ same“. La hispanaj samideanoj estu salutitaj plej varme, apero de ilia bulteno signifas revivigon de la movado ankaŭ en ilia lando.

**La 35-a Japana Esperanto-Kongreso** okazis en Osaka la 25—26-an de Oktobro 1948 kun partopreno de ĉirkaŭ 150 membroj el diversaj partoj de la lando. La kongreso aprobis interalie la proponon iniciati Orientan Esperanto-Kongreson, kiu okazus en Japanujo la venontan jaron kun celo inviti la Universalan Kongreson al iu ajn urbo en Oriento iam en proksima estonto. (La Revuo Orienta, Nov. 48.)

**Aŭstria Esperanto-Kongreso en Graz** 16—20-a de Julio 1949 invitas samideanaron el tutmondo. LKK disaŭdigas raportojn pri ĝi ĉiumonate la unuan jaŭdon je la 23,00—23,15 MET sur ondo 338,6 metroj. (Alpenland, Graz, Zsertalĝasse 14/a.) Eksterlandaj esperantistoj ne pagos kotizon kongresan. Unulita ĉambro kostas 12 aŭ 18 a. ŝil. pŝtage. Loĝejo en „Hejmo“ (komuna kun trifoja manĝo) 10 a. ŝ. po tage.

**Esperantaj resumoj en geografiaj revuoj brazilaj.** Antaŭ nelonge aperinta LII-a volumo de „Revista da Sociedade de Geografia do Rio de Janeiro“ (adr. Praça da República 54) dediĉita al fama brazila ŝtatisto Barao do Rio Branco pro lia unua jarcentfestoj. Tiu numero enhavas resumon en Esperanto de ĉiuj artikoloj. De preskaŭ 20 jaroj tiu grava revuo publikigas tiajn resumojn. Ankaŭ la oficiala „Revista Brasileira de Geografia“, organo de la „Nacia Konsilantaro de Geografio“ (adr. Praça Mahatma

Ghandi 14, 5<sup>o</sup>) publikigas de sia apero en 1939 resumojn de la ĉefaj artikoloj. (O Brasil Esperantista, Jul.-Sep. 48.)

**Framasonaj pasportoj en Esperanto.** La Grandoriento de Brazilo per sia Superulo d-ro Joaquim Rodrigues Neves komunikis al Brazila Ligo Esperantista, ke ĝia konsilantaro decidis, ke la framasojn pasportoj, donitaj de tiu Grandoriento, estu ankaŭ skribitaj en Esperanto; kaj la Superulo petis al BLE, ke ĝi traduku la tekston de la pasporto. — La letero de la eminenta advokato D-ro Rodrigues Neves enhavas vortojn tre favorajn por nia lingvo, „kiu efikos por la unuigo de la homoj de ĉiuj landoj per pli solida frateca ĉeno“. (O Brasil Esperantista, Julio-Septembro 1948.)

**Pri la portugala Esperanto-movado** raportas „Informilo de Portugala Esperanto-Ligo“ (Jan.-Feb.). En j. 1947 fiaskis ankoraŭ okazigo de tutlanda E-konferenco. Komence de j. 1948 la Ligo havis 30 individuajn membrojn kaj aron de rondetoj agoniantaj. Sed la sistema laborado estis komencita kaj en Decembro 1948 la Ligo jam havis 480 pagantajn membrojn. La perkoresponda kurso estis disvastigita grandskale. La cirkulanta biblioteko pruviĝis tre utila. Elĉerpiĝis lernolibroj, la nova malgraŭ grandaj malfacilaĵoj estas jam en presejo. Oficialigi la Ligon oni ankoraŭ ne sukcesis, sed la gvidantaro firme esperas, ke la jaro 1949 signifos pluan firmigon de la movado.

**„Antaŭen, Bulteno de Esperantista Klubo de Florianopolis (Cx. p. 206)“.** Tiu ĉi ciklostilita bulteno, kies 9-an numeron el 15. X. 1948 ni legis, estas plua pruvo pri vigleco de nia movado en Brazilo.

**„Sindikatisma ne estas politiko,“** jen la devizo de sindikatanoj eldonantaj bultenon „Esperantista Sindikatanon“ (20, rue du Béquet, Bégles, Gironde, Francio). Starpunkto de ĉeĥoslovaka Revolucia sindikata movado (ROH), kiu estas organizinta jam preskaŭ ĉiujn ĉeĥoslovakajn laborantojn, estas tute kontraŭa. Ni nepre ligas kun sindikata organizo progreseman politikon en la plej klara signifo de la vorto. Ni ne pensas, ke plibonigi bonfarton de laboristoj estas eble sen bona progresema politiko.

**Scienca Revuo**, oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista aperis la 15. 3. 1949 kiel bela 40-paĝa kajero, tre zorge redaktita de W. P. Roelfs (Kerkpaad ZZ 53, Soest, Nederlando). El la artikoloj ni precipe kun aproba laŭdo citu: La historio de DDT, Formuloj en esperantaj revuoj, Rimarkoj pri funkcioj de Euler, la faktora funkcio kaj la binomaj nombroj, Voĉdonadoj kaj iliaj rezultoj. La redaktoro tre atentis la lingvaĵon, enestas jam en la unua numero „Diskuto pri terminoj“. Estis ĝuo foliumi kaj legi tiun ĉi kajeron. S. R. aperados kvaronjare, administracio por ISAE estas ĉe G. F. Makkink, Eekhoornlaan 10, Bennekom, Nederlando. Abonprezo Neder. gld. 5.—. ISAE-delegito por nia lando estas M. Litera, n. pres. Beneše 16, Jablonec n. N.

**La profesiaj unuigoj en Pollando** forte ekinteresiĝis dum 1948 pri Esperanto agnoskante la ĝustajn vortojn de la granda rusa verkisto Maksim Gorkij, „ke la bezono de unu lingvo por la internacia proletaro estas kaŭzata per la unueco de la klasaj interesoj kaj aspiroj de proletaro“. (Mgr Isaj Dratwer en Inter. Kulturo, 1-a n-ro 1949.)

**„Kaptitoj sur la glaciŝtuko“**, verko de F. Omelka, nia membro, aperas poparte en „Esperanto“ tiujara. Estas interesa novelo, tre leginda, streĉanta atenton de la leganto, rakontata per klara stilo. Ĝia apero estas plua signaco de aktiveco de ĉeĥoslovakaj samideanoj. Gratulon al la aŭtoro!

**Julij Tojoda mortis 17-an de Junio**, ni legas en la nun en niajn manojn veninta numero de Julio 1948 de La Revuo Orienta, Tokio. La vortoj nin profunde tuŝis, ĉar restis en nia memoro tiu ĉi aminda japana samideanino, kiu vizitis la urbon Praha en la jaro 1936. Ŝi gajnis ĉies simpatian, vizitis la klubon en sia brila kimono kaj parolis tie en perfekta Esperanto. Ŝi vizitis ankaŭ niajn hejmojn, lernis niajn infanojn kanti japanajn kantojn kaj fari mirindajn ludilojn el faldita papero. Ni atendis, ke ni aŭdos post la milito ĝojigan sciigon pri ŝia farto kaj progreso en la muziko, kiun ŝi studis en Eŭropo. Sed, ho ve! Trafis nin tiu ĉi funebra informo, en kies japanlingva parto ni legas ankoraŭ, ke ŝi mortis dum kolektado de peonioj subite en Akisava, distrikto Jamaŝi, kie ŝi aktive laboris en la esperantista movado. Ŝi edziniĝis dum la milito kaj ŝia nuna nomo estis Jamazaki. Honoron kaj pacon al ŝi! (O. G.)

## Překlad úkolu 22.

Klement Gottwald al la kongreso de la ĉeĥoslovakaj verkistoj en Praha la 8 Marto: Mi atribuas<sup>1</sup> al via kongreso grandan gravecon. Mi nome opinias,<sup>2</sup> ke per ĝi fermiĝas<sup>3</sup> la unua periodo de la postmaja kaj precipe de la postfebruara fundamenta ŝanĝo<sup>4</sup> en nia literaturo kaj en la tuta kulturo, la periodo de serĉado<sup>5</sup> al novaj vidpunktoj, novaj vojoj, nova orientado.<sup>6</sup> La periodo, en kiu antaŭ ĉio definitive fariĝis klara,<sup>7</sup> ke la arto, indiferenta al la intereso de la popolo kaj de la nacio, aŭ eĉ sin malŝate deturanta de ili,<sup>8</sup> la arto (en)fermita en si mem, simple la tiel nomata pura arto ĉiunuan kaj ĉiuspeca,<sup>9</sup> perdis en nia nova socio la lastan, eĉ nuran ŝajnon de progresemo kaj fariĝis — kiel vi bone<sup>10</sup> diras en la nova statuto<sup>11</sup> de la Asocio de verkistoj — la ĉefa bremsa por la plua progresema disvolviĝo de la ĉeĥoslovaka literaturo. Ĉar ne voli havi ion komunan kun la vivo de la socio — kaj tio en la pasinteco povis esti esprimo de certa, kvankam ne klara<sup>12</sup> opozicio kontraŭ la socio kapitalista — signifas hodiaŭ ne voli havi ion komunan kun sia propra popolo,<sup>13</sup> kiu levigis por konstrui novan homan ordon, portanta liberecon,<sup>14</sup> kreo-ĝojon kaj feliĉon al la antaŭe subpremataj popolmasoj. Tio signifas stariĝi<sup>15</sup> al la flanko<sup>16</sup> de tiu tre diversspeca<sup>17</sup> societo de reakciaj bankrotuloj, kiuj ankaŭ „ne volas havi ion komunan“ kun nia popola demokratio, kun nia konstruado de socialismo. — Tio ĉi estas do hodiaŭ jam klara. La periodo de tiu klarigado finiĝis jam per tio, ke vi jam komencis la fondon de nova idea organizo de literaturaj fortoj, kiu sian ĉefan taskon vidas en la aktiva krea<sup>18</sup> partopreno en la konstruado de pli bona estonteco<sup>19</sup> de nia patrujo, en la edukado de nova socialista homo. Tio estas granda afero, granda paŝo antaŭen sur la vojo de nia literaturo kaj kulturo; kompreneble, per tio venas en antaŭon<sup>20</sup> kun ankoraŭ pli granda urgeco<sup>21</sup> la plua parto de la tasko. Venis<sup>22</sup> la tempo por komenci ankaŭ en nia literaturo novan ĉapitron titolitan,<sup>23</sup> De paroloj al agoj. Ankaŭ ĉi tie ni havas jam videblajn komencojn, ankaŭ ĉi tie jam ekkuris la unuaj fluetoj. Sed ni bezonas tutan potencon flueglon, tutan impetan<sup>24</sup> alfluon<sup>25</sup> de nova, ideo batala entuziasma arto. Nia popolo rekte soifas je tia arto, kiun ĝi povus nomi sia. Ĝi estas granda sukceso de nia popola demokratio.

## Poznámky.

<sup>1</sup> mi aljuĝas. Vian kongreson mi konsideras tre grava. Nikolí: mi almetas, almeti zamená aldone meti, na př. almeti plumojn al ĉapelo; al tiu antaŭtimo sin almetis alia pli grava (PV); <sup>2</sup> Ĉar mi opinias. Per ĝi, miaopinie, finiĝas...; <sup>3</sup> finiĝas; <sup>4</sup> transformiĝo, aliformiĝo; <sup>5</sup> la periodo, en kiu ni serĉis; <sup>6</sup> orientiĝo; <sup>7</sup> klarigiĝis; <sup>8</sup> aŭ eĉ malŝate forturniĝanta de ili; <sup>9</sup> arto de ĉiuj nuancoj kaj specoj; <sup>10</sup> ĝuste; <sup>11</sup> regularo; <sup>12</sup> ne klare konsci(at)a; <sup>13</sup> samnacia, samgenta popolo; <sup>14</sup> v případech, kde na 4. pádu je závislý další čtvrtý pád, nacházíme často v prvním případě pád první: konstrui ordon (kiu estas) portanta liberecon. Text je jasnější než řada akusativů: konstrui novan homan ordon portantan liberecon, kreo-ĝojon kaj feliĉon. Neřekneme: ordon kiu portas, jelikož zde by čtenář mohl „kui“ vztahovat ke slovu „popolo“: popolo, kiu levigis... kaj kiu portas...; <sup>15</sup> sin stariĝi; <sup>16</sup> ĉe la flanko de; <sup>17</sup> bunta. <sup>18</sup> tvůrčí krea, kreanta tvořící. Rozeznáváme: skřiba mašino (jedním slovem skřibmašino) od skřibanta mašino, skřibanta fraŭlino atd. Podobně: nutra manĝaĵo (manĝaĵo por nutr(ad)o a patrino nutranta la infanojn. Luma radio (lumradio) od lumanta suno. Puriga rimedo a mastrino puriganta la loĝejon. Skřiba psací — skřibanta pišící. Nutra živný, výživný — nutranta živící. Luma světelný — lumanta svítící. Puriga čistící — puriganta čistící. <sup>19</sup> morgaŭo; <sup>20</sup> tiamaniere antaŭeniĝas, elstaras; <sup>21</sup> intenseco; <sup>22</sup> ekestis; <sup>23</sup> surskribitan, nomitan; <sup>24</sup> entuziasman, štorman; <sup>25</sup> inundon, torentegon.

Překlad úkolu 22 zaslali: Jar. Čížek, Praha; Rudolf Jandík, Černilov; Jos. Košutek, Mor. Nová Ves; Fr. Kuba, Olomouc; Alfred Macek, Pulgáry; Josef Oděhnal, Gottwaldov; V. Růžička, Podmokly; Ant. Schöblová, Beroun; MUDr. Frant. Vaněk, Nová Role a Karel Vít, Gottwaldov. Odměnu za nejlepší překlad dostává p. Fr. Kuba.

## Úkol 23.

Přeložte a zašlete nám do 15. června: (Při práci bude Vám právě vyšlý slovník dobrou pomůckou.)

Látku měříme metrem. Měřila ho opovržlivě. Shlédnul muze vysoké postavy, jenž měřil přímo k němu. Byl vysoké postavy, měřil skoro dva metry. Pozemek měří dva hektary.

Hodina za hodinou mijela, minulo jich hodně. Když láska jednou mine, víc ze srdce se nevyvine. Zlost ho minula. Minul nás aniž odpověděl na náš pozdrav. Minulí jsme starou košatou lípu. Celá akce se minula pravého účinku, výsledku. Se strání mijel snih. Přiznávám, že jsem toto místo schválně mijel.

Mámivá vůně akátů. Mámivá představa. Smysly ho mámily. Mámění satanovo.

Jeho upřený pohled mátl. Nedejte se másti těmi řečmi. Ligi a bindi se někomu mate. Nemať mne při počítání.

Sejdi dolů! Za nedlouho jsme sešli s cesty a zašli do lesa. Napadlo sice trochu sněhu, ale brzy sešel. Sešel hroznou smrtí. Podivil jsem se, jak ten člověk rychle sešel. Se schůze sešlo pro nedostatečnou účast. Přistě se sejdemě včas.

Osobní vlak se srazil s nákladním. V létě se mléko často srazí. V zimě se zráží pára na oknech. Praním se ta látka srazila. Roztok srazíme sírovodíkem.

## Vortaro ĉeĥa-esperanta de Rudolf Hromada

Jus aperis ĝiaj lastaj paĝoj. Ili estas dissendataj al la antaŭpaĝintoj, kiuj estas membroj de nia Asocio 1949. La libra eldono estos preta post nelonge. Ĝia prezo verŝajne ne superos 50 Kčs. La libra eldono estas iom rearanĝita kaj kompletigita (por utiligi ne tute plenajn liniojn).

La aŭtoro esperas, ke la vortaro bone servos al la ĉeĥaj samideanoj. Premata de la lokmanko, li devis limigi sin je vortoj, kiuj ŝajnis al li plej bezonataj, kaj el la esperantomaterialo li povis uzi nur parton, kiun li opiniis plej trafe tradukanta la ĉeĥan esprimon. Li sin bazis sur la materialo troviĝanta en la esperanto-literaturo, ne vidante bezonon nek sentante neceson elpensadi mem vortojn aŭ vortkombinojn. La tradukoj prezentataj estis kontrolataj pri sia uzebleco laŭ la riĉa fraza materialo troviĝanta en la granda ĉeĥa vortaro Akademia: Pŝiruĉní slovník jazyka českého ĝis la aperanta litero S, la cetero laŭ Slovník jazyka českého de Váša-Trávníček. Ke li estis gvidata ĉe sia laboro de la abunda materialo enhavata en la Plena Vortaro de SAT, estas memkompreneble. Multon li utiligis el la bonega sveda-esperanta vortaro de Jansson-Lindén-Gerdman kaj la angla-esperanta de Fulcher-Long, celante unueciĝi la esprimmanieron.

La vortaro dediĉas specialan atenton al la ĉeĥa verbo, kun ĝia riĉa homonimeco, klarigante ĝiajn diversajn nuancsignifojn. Kiel ekzemplon vidu la verbon seĵiti k. m. a. Ties utilon scios taksí ĉiu, kiu efektive uzados la vortaron tradukante ĉeĥajn tekstojn.

Ĉar bona vortaro ne povas esti verko de izolula cerbumado kabineta, la aŭtoro kontroligis la manuskripton de spertaj samideanoj. Speciale koran dankon li esprimas pro la zorga kontrolo al Dr. Stan. Kamarýt en Chotěboř, Jiří Kořínek en Brno, D-ro Tomáš Pumpr en Praha kaj H. K. Bouška en Praha. Tamen, pro la eventualaj mankoj respondecu la aŭtoro mem.

Ne malpli granda danko apartenas al s-o Frant. Milek, kiu kun granda kaj sindona zorgemo kompostis la vortaron dediĉinte al tio multon el sia feria tempo.

Siajn rimarkojn, sugestojn kaj kritikojn sendis krome: D-ro Rud. Pawlik, Ostrava, Erh. Urban, Praha, Jos. Řebíček, Olomouc kaj nesubskribinta samideano(j?). Ankaŭ ili akceptu koran dankon, eĉ se ne ĉio povis esti akceptita.

La aŭtoro estus tre kontenta, se lia vortaro instigus al plua kritikado. Nur el tia kolektiva laboro povas naskiĝi verko, kiu atingos maksimumon de perfekteco.

R. H.

# SCIIGOJ

## Tri Slovaka Esperanto-Kongreso

okazos en Bratislava la 30.—31. VII. 1949. Kongreskotizo 50 Kĉs. La plej granda parto de kongresanoj povos esti enloĝigata en la nova moderna altlerneja internato. Fervoja rabato 33% por ĉiu kongresano. Kongresaj glumarkoj 30 pecoj por 10 Kĉs. Ni invitas niajn legantojn aliĝi grandnombre. Aliĝilojn, pagilojn, prospektojn sendas Loka Kongresa Komitato en Zámocnická 8/I, Bratislava I.

**Regiona manifestacia kongreso en Ostrava-regiono** okazos la 11—12-an de Junio kun honora patroneco de prezidanto de la Centra Nacia Komitato s-ro J. Kotas kaj de Centra Kultura Konsilantaro de la urbo Ostrava. Sabaton vespere okazos koncerto en halo de „Ligna Reĝolando“ (Masaryk-placo), dimanĉon je la 9,30 h en halo de Hasiĉský dům (ul. odboje 8) manifestacia kunveno kun prelego de Th. Kilian: „Esperanto en lernejoj!“, je la 15 horo ĝardenfesto ĉe Pěřínek en Hrabůvka, je la 20 h. danco. Grandaj aliŝoj ĉeĉ- kaj esperant-lingvaj invitas vastan publikon. - Arangas Regiona Esperantista Laborkomitato.

**En Liberec** kunvenos komitatanoj de la Asocio kun anoj de LKK sabaton la 4. 6. en la klubejo (Šamánkova 4a) je la 18-a horo. Venu akurate!

La kongreso estos versimile manifestacio tre impona. Venu ĉiu, kiu povas!

**Rendevuo de Esperantistoj el suda Moravio** okazos la 19-an de Junio 1949 en Břeclav. El tie iros ekskurso al Lednice, fame konata perlo de suda Moravio. En Lednice ni trarigardos belegan kastelon de princo Lichtenstein, arta konstruaĵo en gotika-renesanca stilo kun vintra ĝardeno. Palma oranĝerio estas 92 m longa, 13 m larĝa kun grandaj palmoj kaj orienta vegetaĵaro. En grandega parko plenplena de diversaj floroj malantaŭe staras fiere turka minareto, nomata ankaŭ babilona turo, alta 63 m kun 304 ŝtupoj. En kelkaj ejoj vi vidos belegajn orientalajn pentraĵojn kaj de la plej supra galerio vi havos ĉarman ĉirkaŭrigardon. Venu, vi estos kontentaj. Detalajn informojn postulu de Esperanto-Rondeto Břeclav aŭ de Rudolf Trojna, sekretario, Břeclav.

**Radio-Praha.** Depost la 15-a de Majo okazis grandaj ŝanĝoj en horoj de la programo. Sed esperantlingvaj dissendoj sur mallongaj ondoj restas sen ŝanĝo. Sur mezaj ondoj oni dissendas per Praha I nur ĉiun vendredon je la 22,50—23,00 h de ĉs. somera tempo, kio estas 21,50—22,00 h MET aŭ 20,50—21,00 h de GMT. La unua vendredo de ĉiu monato estas dediĉita al programo de la Verda Stacio. Depost 3. 10. oni revenos al la kutimaj horoj ankaŭ sur mezaj ondoj.

**Radio Ostrava** — ondo 259 metroj — disaŭdigas Esperanto-programon nun ĉiun jaŭdon je la 22-a horo laŭ normala mezeŭropa tempo. Ni petas urĝe la eksterlandajn aŭskultantojn, ke ili konfirmu almenaŭ per mallonga poŝtkarto, adresitan al Radiostacio Ostrava, Ĉeĥoslovakio, sian intereson. Depost Julio havos tiu stacio duoblan intensecon.

**Radio-Sofia** sur mallonga ondo 39,11 metroj je la 21,00 ĝis la 21,15 h de somera ĉeĥoslovaka tempo dissendas de la 28-a de Marto ĉiutage novaĵojn pri kulturaj, ekonomiaj kaj socialaj temoj. Aŭskultu kaj konfirmu la aŭdon!

**Unika internacia kurso en Svedlando.** Kiam la esperantistoj korespondas, ili ofte traktas la vivkondiĉojn de la popoloj en la koncernaj landoj. La intereso pri tiaj problemoj instigis Svedan Esperanto-Instituton admoni la tutlandan svedan popoledukan asocion inviti eksterlandajn kune kun la svedaj diskuti la sociajn arangojn, kiujn faras la ŝtatoj. Ĉar la kurso okazas en Svedlando, oni prefere bazu la traktadojn je svedaj cirkonstancoj, sed post la enkonduka prelego oni diskutu la temon el internacia vidpunkto. Tial oni ankaŭ postulu de la partoprenantoj, ke ili havu certajn sciojn pri la koncernaj aferoj en la hejmlando.

La propono de Sveda Esperanto-Instituto estis akceptata sub tre favoraj kondiĉoj. La instituto zorgas pri la organizado de la kurso, pri la havigo de prelegantoj k. t. p., sed la elspezojn de la kurso pagas la ne-esperantista asocio.



Adolf Malik,

prezidanto de la Asocio antaŭ mikrofono.

Multe da stipendioj. La kurso trovis ĝeneralan aprobon. I. a. la tutlandaj oficista kaj laborista fakorganizajoj rekomendas ĝin al siaj membroj. Pluraj sindikataj federacioj kaj la kooperativa Asocio donis sufiĉe grandajn monsumojn por ebligi al ne-svedoj partopreni.

Ĝis nun aliĝis al la kurso personoj el Bulgarujo, Britujo, Francujo, Germanujo, Nederlando, Norvegujo, Polujo, Svedlando, Turkujo kaj Usono.

Sed ankoraŭ estas pluraj liberaj lokoj en la kurso. Ĉar ni antaŭvidas, ke tiu kurso estos por la kursanoj tre instrua kaj samtempe amuza, ni admonas la esperantistojn aliĝi. Bonvolu informi, ĉu vi estas preta mem pagi la kurskoston, kr. 90.—, aŭ ĉu via partopreno estas dependa de stipendio. Bonvolu ankaŭ indiki kiun profesion vi havas, ĉar la stipendion ni devas ricevi de la koncernaj svedaj fakasocioj.

La kurso okazos 26 Junio — 10 Julio en Viskadalen apud Gotenburgo. La temoj de la kurso estas: Konstitucia sistemo, kooperativaj organizoj, lernejoj, sociaj problemoj, sociaj arangoj en la lernejoj, pensioj, asekurado, kulturaj memoraĵoj k. t. p. Petu detalajn informojn ĉe Sveda Esperanto-Instituto, Tegelbacken, Stockholm, Svedlando.

**XIV-a Kongreso de Flandra Ligo Esperantista** okazas dum pentekosto en Gent. Ĉeĥoslovakaj esperantistoj sendas sian koran saluton al tiu kongreso, kiu okazas samtempe kun la nia en Liberec.

**Aŭstria ŝtata trafikoficejo** starigis specialan Esperanto-sekcion. Ĝi volas plifaciligi al esperantistoj vojaĝadon tra bela Aŭstrio. Sendu gratulkarton al: Aŭstria trafikoficejo, Esperanto-sekcio, Friedrichstrasse 7, Wien I kaj vi ricevos belan prospekton afrankitan per la nova Esperanto-poŝtmarko.

# RICEVITAJ LIBROJ

**O zkouškách z esperanta.** Všeobecné poučení a syllabus otázek. Připravila zkušební komise. Zredigovali: Dr Stan. Kamarýt a Dr Tomáš Pumpr. Vydal Svaz esperantistů Československé republiky v Praze XIX/7, pošt. příhr. 7075. Vytiskl Čil v K. Varech r. 1949. 16 paňoj 15×21 cm. Prezo 10,80 Kčs afrankite. Broŝuro kompilita de la Asocia Ekzamena Komisiono donas klarigojn pri la ambaŭ gradoj de la ekzamenoj (pri lingva scio de Esperanto kaj pri kapableco instrui Esperanton en lernejoj kaj kursoj). Estas donitaj listoj de temoj el Esperanto-gramatiko, sintakso kaj stilistiko, el teorio de internacia lingvo, historio kaj organizo de esperantismo, esperantlingva literaturo. Poste estas temoj el didaktiko ĝenerala kaj el ĉeĥaj gramatiko kaj literaturo. La broŝuro estas helpilo por kandidatoj de la ekzamenoj, ke ili trovu en la donitaj temoj apogilojn por sia studado.

**Karel Čapek: Skizoj pri Nederlando kun desegnaĵoj de la aŭtoro.** El la ĉeĥa lingvo tradukis G. J. Degenkamp. Reviziis laŭ la originalo E. Faulhaber-Čiškovská. Libro-servo F. L. E. Roelantstraat 4. Amsterdam - W. 96 paňoj 12×20 cm. — Traduki la verketon de la fama aŭtoro „Obrázky z Holandska“ ne estis facila tasko, ĉar ĝia lingvaĵo ŝajnigante simplecon estas tre komplika redonante kun sukceso nuancojn de siaj observoj kaj rezonadoj per diversaj artifikaj lingvoj literatura, slanga kaj dialekta miksitaj majstre. La eminenta tradukinto pruvis ne sole sian estradon de Esperanto, kiu estas ĝenerale konata, sed ankaŭ tre bonan scion de la lingvo ĉeĥa, pri kiu ni ne sciis. Ni salutu lin pro tiu agrabla surprizo sincere. Li efektive sukcesis redoni la ĉeĥan tekston komplete, fidine kaj tuj kompreneble per lingvo klara, egalanta al klareco de la originalo. Ni laŭdu tie ĉi almenaŭ la taŭgajn tradukojn de la malofte renkontataj vegetalaj nomoj se ni volas citi la tutan mallongan liston de uzitaj neologismoj. Ĉiujn mi aprobas, krom „inercio“. Ĉu ne sufiĉas inerteco aŭ inerta forto? Kaj kial ne diri klasikismo? — Sed estu permesite diri ĉe tiu ĉi okazo demandon pri unu problemo traduka: La aŭtoro enmetas en sian lingvaĵon diversajn parolturnojn el la familiara lingvo, la tradukinto redonas ilin laŭ la senco bone. Sed ĉu ni ne devus provi tiajn nuancojn imiti ne simple redoni la senco sed ankaŭ la spritecon de la lingvaĵo? Ekz.: La aŭtoro uzas ofte vokativon „homo“, kiun uzas familiara lingvaĵo ĉeĥa por emfazi iun aserton precipe ĝian sentan aŭ sentimentalan nuancon. En ĉeĥa lingvo tiu vokativo estas tuj ekkonebla, ĉar ĝi diferencas de nominativo per finaĵo (nom. člověk, vokativo člověče), sed en Esperanto ambaŭ kazoj sonas egale, do la du komoj estas la sola indikilo. Ĉu ne estus rekomendinde anstataŭ „homo“ diri „vi homo“? Ie diras la tradukinto anstataŭ homo leganto, kion mi trovas saĝa. En Esperanto la vorto „homo“ havas tro abstraktan nuancon, ĝi tro najbaras al „homaro“ neniam observebla. Ĉu ne estus eble diri en tiu ĉi situacio „homo“, vorto ne tro kutima kaj iom komika? Se la aŭtoro (sur p. 50) diras kytka li intence uzas vorton malsatigan anstataŭ květina; ĉu ne estas troa malsatigo en „floraĉo“, kiam la amo de aŭtoro al ĉiuj vegetaĵoj estas evidenta kaj kiam li per termino malsatiga volas nur kaŝi sian amon al la floraro? Se la aŭtoro parolas pri ĝangalo de floroj, kial mildigi tion per „densejo“? Sur paňo 51 ekz. mi dirus anstataŭ „distingiĝon“ „grandsinjorecon“. Multajn „kaj“ de la originalo mi ne forlasus, ili ja volas akcenti la familieran tonon de la rakontanto. Komprenu min bone: mi diris jam, ke la traduko tre bone redonas la senco de la originalo. La metitaj demandoj volas esti sole teoriaj kaj volas montri tradukproblemojn, kiuj naskiĝas dum la nuna situacio, kiam la tradukoj estas ĝenerale bonaj kaj sufiĉantaj. Sed ni certe provos trovi esprimmanierojn, kiuj ebligas redoni ankaŭ tiajn nuancojn de la originala lingvaĵo, kiujn oni ĝis nun ne povis nek volis atenti. Mi uzis okazon de traduko tiom bona por povi pri ili paroli.

**Faktoj pri Danlando.** Internacia serio de „Kiu-kio-kie“. Eldonita de la tagĵurnalo Politiken, Kopenhago. 1948. 64 paňoj 12×17 cm. (Libro-servo de Centra Dana E. Ligo, Pr. Jørgensgade 4 A, Kopenhago N., Danlando). — La tre bele presita kaj ilustrita broŝuro redaktita laŭ tre populara danlingva libro „Kiu-kio-kie“ (aperinta en la 15-a

eldono en j. 1948 en 140 000 ekz.) donas en konciza formo informojn pri Danlando tre detalajn kaj tre praktike aranĝitajn. Malofte mi renkontis similan informan broŝuron, kiu tiom plaĉus al mi. Oni estas instruata preskaŭ pri ĉio ajn. Komencante de pri „Historio de Danlando“ (826—865 Ansgar predikas la kristanisman en Skandinavio... 1947 Reĝo Kristian la Deko mortas kaj Frederik la Naŭa estas proklamata reĝo) oni foliumas la libreton kaj oni perdas multajn minutojn ne sen profito por sia scio. En la lasta ĉapitro „Famaj danoj, kiu estas konindaj“ oni legas kiel pri la unua Absalon (1128—1201, ĉefepiskopo kaj ŝtatesto kaj kiel pri la lasta Bohr Niels (n. 1885), fizikisto kaj atom-esploristo. Sed oni estas informata pri multaj aliaj faktoj ekzemple pri Feroaj Insuloj, Grenlando, Armeo kaj milita ŝiparo, Terkulturo, Fiskaptado ktp. Mi gratulas al la redaktoroj (Helge Larsen, Bo Bramsen, Finn Rosetzsky) same sincere kiel al la tradukintoj (Poul Thorsen kaj H. V. Rasmussen) pro tre bone plenumita tasko malfacila. Se oni demandus min, kiun ĉapitron mi trovas la plej sukcesinta, mi nomus tiujn pri Armeo kaj „kiu estas kiu“.

**Jarlibro de Universala Esperanto-Asocio, 1949. Unua parto.** Nur por uzo de membroj. 244 paňoj 12×15 cm. — En konate bela tipografia arango kaj zorga redakto de nove nin ĝojigis. Enestas adresoj de 1108 delegitoj, 184 vicdelegitoj, 932 fakdelegitoj, sume 2224. Membroj de UEA estas en 70 landoj, sume 17 707. La plej granda nombro de Membro-Abonantoj estas el Britujo 804, krom la 103 subtenantoj. El Francujo estas 404 MA, el Nederlando 424. El Ĉeĥoslovakujo estas 2116 Asociaj membroj, 45 MJ, 291 MA, 3 MS, 2 DM, 2 HM. Sed provizora neeblo pagi malebligas al ni kolekti la aliĝojn, da kiuj estus nombro multe pli alta. Kunlaborantaj fakaj asocioj estas 7. La jarlibro estas kiel ĉiam dokumento pri vivanteco de nia movado spite malfacilaĵojn ekonomiajn kaj politikajn, kontraŭ kiuj ĝi devas ankoraŭ barakti, ĉar la mondo dronas en ili.

**Enketo pri internacia helplingvo.** Eldonita de Sveda Esperanto-Federacio (Stockholm, Svedujo) laŭ peto de Universala Esperanto-Asocio. 32 paňoj 15×21 cm. Por 5 respondkuponoj ĉe la Sveda E-Federacio, Tegelbacken, Stockholm. — IALA komisiis post sia fondiĝo en 1924 Instituton J. J. Rousseau (Instituto de Eduk-sciencoj) en Genevo sciigi pri la jam instruataj kaj uzataj helplingvoj, kunigi materialon por starigi testojn taŭgajn por komparaj studoj, kiu el tiuj lingvoj plej respondus al la postuloj, redakti testojn ĉiuloke uzeblajn por mezuri rezultojn de instruado de helplingvoj, kontroli ĉiun apartan uzitan teston kaj fari komparojn rilatajn al konstateblaj kvalitoj de kursoj kaj kursanoj, konkludi el faritaj eksperimentoj, ĉu jam ekzistas taŭga helplingvo, kiu povus esti proponata kiel sola helplingvo por ĉiuj homoj. La esplorado daŭris ĝis jaroj postmilitaj kaj resuma raporto donata en tiu ĉi libreto estas datita Someron 1948. La esplorojn gvidis persone profesoro de eksperimenta pedagogio en la Geneva universitato kaj direktoro de la Instituto Pierre Bovet kun sekretariino Henrietto Ith. La raporto estas tre leginda pro la koncize kaj klare priskribitaj metodoj uzitaj kaj rezultoj atingitaj. Aperis, ke neniu el la helplingvoj povis esti esplorata pri rezultoj en la instruado krom Esperanto, kiu inter la pluraj projektoj estas la sola helpa lingvo efektive vivanta kaj instruata. Oni krome trovis, ke ankaŭ la t. n. interna ideo estas grava faktoro, kiu helpas en lernado de Esperanto entuziasmige la studentojn. Estis mezurataj rezultoj en tre diversaj kursoj, kaj estis konstatataj centraj valoroj pri rezultoj de instruado. Niajn legantojn ĝojigu rezulto, ke en Ĉeĥoslovakio estis tiuj centraj valoroj tre altaj kompare kun aliaj landoj. Ekz. en tabelo pri Diversmetodaj kursoj estas nia lando sur unua loko kun centra valoro 73,12 dum meznombro de ĉiuj esploritaj landoj estas 66,66 kaj la plej lasta estas 57,49; en la listo de Ĉe-metodaj kursoj staras nia lando sur dua loko post Palestino. Ni klopodos tiun gravan publikacion proponi al publikigo en ĉeĥa traduko en iu pedagogia revuo. — Ankaŭ la lingvaĵo de la broŝuro meritas laŭdon same kiel la klara stilo. Sole unu malatenton ni trovis sur p. 11: en la dua tabelo devas esti en difino pri „centra valoro“ dirita meznombro anstataŭ diferenco.

## ESPERANTISTA VIVO

**MUDr. Frant. Vaněk** 65-jara (nask. 28. 3. 1884 en Třeboň). La fakto devas esti enskribita spite lian malkonsenton, ĉar lia kazo estas pruvo, kiom konvinka estas simpla demonstro pri uzebleco kaj uzateco de Esperanto, precipe kiam temas pri personoj, kies inteligenteco superas la meznivelon. Li esperantistiĝis, kiam li en 1935 en L. Bělohrad aŭdis en kuracista kunveno esperantlingvan saluton de doktoro Marek kaj fluan nepreparitan esperantlingvan respondon al li fare de provinca vicurbestro. Profesoro Kožený tuj aranĝis laŭ lia iniciato kurson en lia loĝloko Dolní Bousov kaj fininte la kurson kun eksterordinara fervoro Dr Vaněk tuj ekinstruis en kurso nova kaj Esperanto fariĝis la granda amo, al kiu li restas fidela ĝis nun. Kaj li estas amanto aktiva, kiel decas. Li estas kuracisto tre ŝatata, scianta funda de pluraj lingvoj, amatora muzikanto kun nekutima sperteco. Dum junaĝo li vivis plurajn jarojn en Ljubljana kaj Trieste, kiel soldat-kuracisto, ekŝiĝinte el soldata servo kiel majoro li dum kvaronjarcento laboris kiel kuracisto en Dolní Bousov, nun li laboras kiel fabrika kuracisto en Nová Role. Dum milito li estis jam la 1-an de Septembro 1939 arestita de Gestapo en Zítav, en la celo li instruis al 5 kunarestitoj Esperanton. Post nelonge ellasita, li estis ankoraŭ foje esplorata de Gestapo en Jičín pro esperantistaj kontaktoj, sed sukcesis foriri nur kun admono. Travivante sian sepnan jardekon kiel kontenta patro kaj avo dum intensa laboro profesia kaj eksterprofesia li estu ankaŭ pro tiu laborkapablo salutita same de siaj samepokanoj kiel de siaj disĉiploj! Jes, estus bele, se li kreus skolon.

**Milda Jakubcová**, prezidantino de Loka Grupo en Brno-Zidenice (nask. 23. 5. 1899) estas kvindekjara. Ni salutitu amike pro ŝia persista kaj sukcesa laborado iaman sekretariinon de Latva Esperantista Asocio kaj kunlaborantinon de latva revuo „Ondo de Dargava“ en Riga, nunan kunlaborantinon de Esperantisto Slovaka kaj diligentan instruantinon en multaj kursoj.

## Librovendejo de EAĈSR povas rapide liveri:

Leterpaperojn kun esp. emblemo, 20 paperoj kaj 20 kovertoj Kĉs 20.—  
Leterpaperojn aerpoŝtajn, 20 pap. kaj 20 kov., Kĉs 30.—  
Afranko aparte.

**Ĉeflingvan invitilon al Esperanto-kurso** kun taŭga varba teksto (Proletári vŝech zemí, spojte se!) kaj kun aliĝilo eldonis nia nova grupo en Plzeň. La aliĝilojn liveras ankaŭ la Librovendejo de EAĈSR por 32,— Kĉs (krom afranko) po 100 ekz.

**Karsto**, la interesa libreto pri la subteraj grotoj moraviaj, kun multaj ilustraĵoj, denove havebla. Por 11.50 Kĉs aŭfrankite.

**Eksterlandaj revuoj.** Provizore ni ne povas akcepti novajn abonojn por Esperantologio, Malgranda Revuo kaj sveda Espero kaj ni ne povas garanti, ke ĉiuj abonintoj ricevos la revuojn. Eble ni estos devigitaj al iuj resendi la pagitan abonon.



### Město ve znamení ohně

Vyplnili jste již objednáací listek na esperantský překlad novely Město ve znamení ohně? Velmi doporučujeme našim čtenářům předběžnou objednávku. Zašlete vyplněný tiskopis přímo pí B. Vlčkové v Kladně 3, čp. 710.

### Komercistoj! Filatelistoj!

Anoncu en ABC-Internacia borso — heroldo de ĉiuj kolektantaj fakoj kaj plaĉoj. Profitu ĝiajn servojn. Postulu projektojn de profesoro Petro Zévl, Kralovice u Plzně, Ĉeĥoslovakujo.

## Letní kolej esperanta v Doksech

(Somera kolegio de Esperanto en Doksy)

16.—30. VII. 1949

Ĉtĕte podrobnosti v minulých číslech!

## SUPERA SOMERA ESPERANTO-KURSO en la fama ĉs. banurbo KARLOVY VARY

3.—16. Julio 1949

**Aranĝas Loka Esperantista Klubo.** Loĝado en internatoj aŭ en familioj. Loĝo kaj manĝo dum 14 tagoj (kun kursa kotizo) 1100 Kĉs.

**Konversacio, preparo por ekzamenoj.** Instruas membroj de la Ekzamena Komisiono Asocia. — Partopreno en la banloka vivo. Ekskursoj.

**Aliĝu ĉe:** S-o Ant. Reček, faka instruisto, Stalinovo nám. 5, Karlovy Vary.

**Partopreno de eksterlandaj samideanoj** bonvena! Uzu la favoran okazon pasigi du semajnojn en la mondfama banloko en rondo esperantista.

## KORESPONDI DEZIRAS:

S-ro Imre Löffler, XII. Hieronymi ut 63. Budapest, Hungario.  
F-ino Johanna Sprengels, Molenlaan 149. Roterdamo, Nederlando.

F-ino Rie den Boer, Regentessestraat 21. Nijmegen. Nederlando.

S-ro Jac. Hakkennes, Rozenlaan 121 b, Rotterdam N2. Nederlando.

S-ro Francisco Seliaris, Tarrasa, Galileo No 19. Hispanio.  
S-ro Albert Marmenout, Rijksmiddelbare school, Onderwijsstraat, Blankenberge. Belgio.

S-ro Johan van Mierlo, Schoolstr. 72. Eindhoven. Nederlando. (L, PK)

S-ro Genčo Vasilev Hristov, Slivnica 17. Ruse. Bulgario.  
S-ro Jan Krivák, Hluk 489, ĈSR, deziras korespondi ankaŭ kun samideanoj el la Respubliko.

F-ino Regina Bojanowska, 19-jara studentino de Bel-artoj, Starowiejska 25/3, Gdynia, Pollando.

Ramon Vila Catlla, Guimera, 45, 1, 2 Manresa — (Barcelona), Hispanio, ne povas pro multaj korespondadoj el ĈSR nun respondi kaj petas pardoni tion al li.

Jozefo Schiller, Ŝvermova 25, Opava, ĈSR, dez. intŝ. PM sur registritaj leteroj kun ĉiuj landoj.

Jiří Mošna (16-jara), ulice Českých bratří 668, Jičín, ĈSR, dez. intŝ. PM kaj PK. Certe respondos.

Angla samideano pri literaturo kaj muziko. Adreson donos Frant. Sedláček, Hartvikovice 142, p. Náměšť n. O. Jan Šubr, Sady 919, Radoŭín u Prahy, PK, PM, tuj respondas.

M. Vávrová, direktorino de la II-a mezlernejo en Vančurova 9, Litoměřice, ĈSR, por siaj studentoj 11—15-jaraj. Olda Ploch, komercisto, Fierlingrova 4, Olomouc, ĈSR, kaj intŝ. librojn kaj pm. kun tuta mondo.

Josef Staněk, ĵurnalisto, Spojovací 209/16, Praha IX, kun ĝeesperantistoj el ĉiuj landoj.

Stanislav Šimek, oficisto, Vilémovice, poŝto Sedlec n. Sáz., ĈSR, dez. intŝ. PM kaj semojn de akvofloroj kun tuta mondo.

Ivan Nečev, instruisto, Selo Baniska 70, Belensko, Bulgario, kun ĉeĥa aŭ slovaka junulino.

Lernantoj el Urugvajo, knaboj kaj knabinoj, deziras intŝ. PM kaj PK kun junaj esperantistoj ĉeĥoslovakaj. Postulu adreson de EAĈSR kaj indiku, ĉu vi deziras korespondi kun knabo aŭ knabino.

Pri Ĉeĥoslovakio, pri revolucio, marŝanta en nia lando, pri vivo de nia popolo kaj pri aliaj problemoj dez. korespondi 29-jara kemia inĝeniero en oleo-fabriko T. Takehana, 3449, Tennojico Abeno-ku, Osaka, Japanio.

Vychází měsíčně (10krát do roka). Majitel, vydavatel a nakladatel Svaz esperantistů ĈSR v Praze XIX/7, p. přhr. 7075. Odpovědný zástupce listu Dr Stan. Kamaryt. Členům Svazu zdarma. Členský příspěvek 70 Kĉs. Ůčet pošt. spoř. 9.602. Tiskne »Cik« v Karl. Varech. Ůčast na poštovní novinové službě povolena řed. pošt. v Praze č. j. IA-Gr-2372 OB-48. Dohlédací poštovní úřad Praha 022.